




Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2003 numero 2-a: marto /aprilo
kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de marto



Esperanto-renkonto en 1908 sur la belvidejo Tablettes cœ la pasejo La Tourne en la kantono Neuchâtel.

Dum la renkonto inaŭgura al la festado de la centjara jubileo de SES
ekskurso kondukos al tiu belvidejo la mardon 30-an de septembro.

Sed ne timu! Nun barilo malebligas malaperon abismen!

Rememorigilo

SES informas

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031,
CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: claude.gacond@ne.ch &
gacond@bluewin.ch

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29;
indiki: por Claude GACOND

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy FONTANNAZ, Andy KÜNZLI,
Richard SCHNELLER.

SES informas

Redaktaj datlimoj por la venontaj numeroj

2003-3: majo-aŭgusto: aprile 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de majo.

2003-4: septembro-oktobro: aŭguste 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de septembro.

2003-5: novembro-decembro: oktobre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. ☎: 031 921 44 59. Ret-
poŝto: bgraf.o@bluewin.ch.

Dietrich WEIDMANN, vicprezidanto,
PF 301, 8034 Zürich. ☎: 01 251 50 25.

Retpoŝto: info@esperanto.ch.

Nicole MARGOT, sekretario, Chemin des
Lys 4, 1010 Lausanne. ☎: 021 653 14 67.

Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.

Elisabeth LAUPER, kasisto, Chapeau
Rablé 42, 2300 La Chaux-de-Fonds. ☎:
032 914 39 34.

Retpoŝto: elilauper@bluewin.ch.

Chiara FABBRI, peranto itallingva kaj jun-
ulara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Ret-
poŝto: chiara-fp@bluewin.ch.

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Anoncoj

Paĝo	Neesperantistoj & komercaj	Esperantistoj & nekomercaj
1/8	CHF 40	CHF 20
¼	CHF 70	CHF 35
½	CHF 110	CHF 55
1/1	CHF 180	CHF 90



Svisa kalendaro

Marte

- 15: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
25: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
27: Basel: ESB: kunveno.
29: Chaux-de-Fonds: Ĝenerala Asembleo de KCE.
29-30: Chaux-de-Fonds: KCE: Monatfino.

Aprile

- 01: Chaux-de-Fonds: CDELI: studrondo.
02: Luzern: LES: kunveno.
03-06: Basel: Jarkunveno de SES kaj Kultura Tri-landa Renkontiĝo.
12: Zürich: ESZ: kunveno.
16-22: Savona: 27-a Internacia Junulara Festivalo.
17-21: Chaux-de-Fonds: KCE: 5-a PIK.
24: Basel: ESB: kunveno.

Maje

- 06: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
07: Luzern: LES: kunnversacia rondo.
10: Zürich: ESZ: kunveno.
10-16: Dresden: 55-a IFEF-Kongreso.
17: Printempa Tago de JES.
20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
22: Basel: ESB: kunveno ĉe B. Spalinger.
24: Chaux-de-Fonds: CDELI: kun Ed. Borsboom
24-25: Chaux-de-Fonds: KCE: Monatfino.
29 ĝis junio 01: Zürich: 100 jarojn bahaa religio kaj esperanto-movado en Svislando..

Junie

- 03: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
04: Luzern: LES: kunveno.
17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
26: Basel: ESB: kunveno minigolfa.

Julie

- 02: Luzern: LES: konversacia rondo.

- 05-12: Grindelwald: SAT-antaŭkongreso.
12-19: La Chaux-de-Fonds: 76-a SAT-Kongreso.
19-26: Lesjöfors: 59-a IJK.
26 ĝis aŭg. 02: Göteborg: 88-a UK..

Aŭguste

- 09: Luzern: LES: ekskurso.
24: Basel: ESB: ekskurso.

Septembre

- 03: Luzern: LES: konversacia rondo.
25: Basel: ESB: kunveno.
26 ĝis 2 oktobro: Kultura Jubilea Internacia Semajno (KJIS): Chaux-de-Fonds: Alvena tago.
27: KJIS: Lausanne-Rolle: Centjara jubileo de la fondo de SES kaj komencp de la jubilea jaro.
28-29: KJIS: Chaux-de-Fonds: CDELI: renkonto kun Edmond Privat kaj Claude Piron.
30: KJIS: Ekskursaj tago.

OktoBRE

- 01: KJIS: Les Brenets: renkonto kun Edouard Ducommun kaj Mireille Grosjean.
01: Luzern: LES: kunveno.
02: KJIS: Chaux-de-Fonds: Konkluda tago.
23: Basel: ESB: kunveno ĉe fam. Focke-Bérout.
25: Ĝenerala Asembleo de JES.

Novembre

- 05: Luzern: LES: konversacia rondo.
27: Basel: ESB: kunveno.

Decembre

- 03: Luzern: LES: Zamenhofa festo.
27 ĝis 3 januaro 2004: Kiel en Germanio: 20-a Internacia Festivalo jubileo en norda Germanio.

2004 Januare

- 07: Luzern: LES: Konversacia rondo.

Vivo de SES

Svisa Esperanto-Societo
kaj
Esperanto-Societo Basel
kore invitas vin al la
Ĝenerala Jarkunveno de SES
kaj al
Kultura Trilanda Renkontiĝo
prepare al la centjara jubileo de SES
sabate kaj dimanĉe la 5-an kaj 6-an de aprilo
kunvenejo de la evangelia metodista eklezio
Riehenring 129, Basel

Ĉar la jaro 2003-a estas tiu de la centjariĝo de la fondo de SES, ni aŭdos kiel SES kreiĝis: Claude GACOND kaj Andy KŪNZLI rakontos al ni pri tiu naskiĝo.

Por marki la baldaŭan eniron en tiun jubilean jaron, nia jarkunveno havos festan karakteron.

(Ne SES-anoj, kiuj estas bonvenaj, rajtos partopreni la tutan sabatan programon,

ankaŭ la rendevuon de aktivuloj kaj la ĝeneralan jarkunvenon de SES.)

Ni planis feston por la sabata vespero kun diversaj programeroj. Se vi iel muzike, kante, lude, ktp... povus helpi al la organizo de tiuj programeroj, bonvolu tion sciigi al ni kiel eble plej baldaŭ.

La dimanĉo komenciĝos per rondirado en Basel. Poste prezentiĝos du

ebloj, ĉu iri en la bestĝardenon kaj tagmanĝi tie en la memserva restoracio, ĉu iri al la muzeo BEYELER kaj manĝi en la ĉina restoracio ne tre fora.

Por ke la restado ne fariĝu tro multekosta ni ofertas privatan tranoktadon ĉe esperantistoj. Kaj junuloj havas la eblon senpage tranokti en la kunvenejo mem sur matracoj. Ili kunportu propran dorm-sakon kaj tukon por kovri la matracon. Alia eblo estas la junulara gastejo. Plie ni povas konsili po unu hotelon en Svislando kaj en Germanio.

Programo

Sabate

- 09h30 Asembleo de SAEF.
11h00 Rendevuo de aktivuloj kun interparoloj kun JES-anoj kaj gejunuloj.
12h00 Aperitivo.
12h30 Tagmanĝo.
14h00 **Ĝenerala kunveno de SES.**
16h00 Kafumado.
17h00 **Prelegas Claude GACOND kaj Andy KŪNZLI pri la kreiĝo de SES (kun lego de partoj el la aperonta enciklopedio).**
19h00 Vespermanĝo.
20h30 **Festo kun kvizo.**
22h30 Bonan nokton!

Dimanĉe

- 09h30 Rondirado tra la urbo.
11h00 Vizito de la Bestĝardeno aŭ

vizito de la BEYELER-Muzeo.
13h00 Tagmanĝo (mempagenda) kaj adiaŭo.

(Programŝanĝoj rezervitaj)

Prezoj (en svisaj frankoj)

Rendevuo: senpage.
Jarkunvenoj de SES: senpage.
Aliĝo al la kultura semajnfino ĝis la 15-a de marto: F 20.-
ekde la 16-a de marto: F 30.-
infanoj ĝis 15 jaroj: senpage.
junuloj: ĝis la 15-a de marto: F 10.-
ekde la 16-a de marto: F 15.-
Vespera programo en la aliĝkotizo.

Menuoj:

Tagmanĝo sabata:

A: Salato, rizo, kokidaĵo, deserto.
B: Salato, rizo, ovaĵo, deserto.
Prezo: F 15.- junuloj: F 12.-

Vespermanĝo sabata:

A: Salatoj, ŝinko, deserto.
B: Salatoj, fromaĝo, deserto
Prezo: F 15.- junuloj: F 12.-

Tagmanĝo dimanĉa:

Bestĝardeno: 12.-
Muzeo: 16.- grupo: 14.-

Aliĝo:

Partoprenontoj bonvolu skribe sendi sian aliĝon al Esperanto-Societo Basel, Postfach 103, 4005 Basel, ĝis la 25-a de marto kun la sekvaj indikoj: Nomoj familia kaj individua, telefono, adreso, menu-deziroj, aliĝdato kaj subskribo. Plej simple estas uzi la aliĝilon de la ĝenerala invitilo, kiu akompanas la bultenon.

Nome de Svisa Esperanto-Societo kaj de Esperanto-Societo Basel: Bruno GRAF kaj Nicole BEROUD FOCKE, kiuj antaŭĝojas ricevi vian aliĝon por kune festi la baldaŭan centjariĝon de SES.

-oOo-

Ĝenerala Kunveno Basel, Riehenring 129 14-a horo – 16-a horo

Tagordo

1. Komunikoj de la prezidanto.
2. Elekto de la voĉnombrantoj.
3. Protokolo de la lastjara kunveno aperinta en *SES informas* 2002-3 (ne laŭlegota).
5. Agado 2003 kaj buĝeto.
6. Reelektoj de la estraro kaj kas-kontrolantoj.
7. Elekto de honora membro laŭ propono de la estraro.
8. Diversaĵoj.

Jarraporto 2002

Rilatoj per interreto

Pli kaj pli esperanto estas uzata en interreto kaj kiu ne havas aliron al ĝi, tiu ne estas tuje informita. UEA kaj aliaj funkciuloj malpli korespondas perpoŝte, sed retroŝtas, tiel ke multaj demandoj estas trakt-

ataj per la elektronika vojo. Kiel listano de „Landa Agado“ mi ricevas ĉiutage plurajn mesaĝojn, ankaŭ se ili ne rekte tuŝas min. Ankaŭ la SES-estraro informiĝas kaj traktas la aferojn perrete. Ni kunvenas nur unufoje jare por prepari la jarkunvenon. Tiel ŝanĝiĝas la labormaniero kaj la mondo.

Kunvenoj

La jarkunveno 2002-a okazis la 6-an de aprilo en Luzern lige kun la 75-jara jubileo de Lucerna Esperanto-Societo. Plej impresis la digna festohoro kun alparoloj, kroniko pri la 75 jaroj de LES prezentita de Andy KÜNZLI, kaj afabla transdono de donaco al la membroj. Du ĵurnalistoj kaj la loka radio faris intervjuojn kaj raportis pri la jubileo, ne sen demandi kiel estos la estonta evoluo. La plej kulmina evento en la loka historio estis certe la 64-a Universala Kongreso okazinta en Luzern en la jaro 1979.

La renkonto kun d-ro Renato CORSETTI, prezidanto de UEA, la 15-an de junio en La Chaux-de-Fonds, estis elstara kultura kaj movada evento. Li vizitis CDELI-n, la lernejon "Grande Ourse" kaj KCE-n, parolis kun la direktoro de la urba biblioteko kaj prelegis pri la situacio de esperanto en la mondo kaj pri la lingvaj homaj rajtoj. Vera

surprizo estis, kiam grupo de esperanto-lernantoj de la "Grande Ourse" parkere prezentis la prezidanton Renato CORSETTI kaj la fondinton de UEA Hector HODLER en ludita intervjuo.

La kunveno de aktivuloj organizita la 19-an de oktobro en Bern estis podio por funkciuloj de lokaj kaj fakaj grupoj. Atentinda gasto estis Andreas EMMERICH, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, kiu respondis al demandoj pri lia persona esperanta kariero kaj pri la agado de la asocio, kiun li gvidas. Unu el la konkludoj estis pli kunlabori inter najbaraj landaj asocioj. La estraro atendis pli da aktivuloj. La intereso pri movadaj problemoj mankas aŭ tuŝas nur la responduojn.

Informado

Mireille GROSJEAN dissendis 3 dosierojn franclingvajn al redakcioj, politikistoj kaj VIP-uloj. La unua parto de la dosiero traktas faktojn pri esperanto, la dua konatigas kun meritplenaj svisaj esperantistoj (Arthur BAUR, Claude PIRON, Claude GACOND). Tiu kombino estas tre taŭga, ĉar personigitaj informoj vekas pli da atento. Ankaŭ Dietrich WEIDMANN dissendis diversajn komunikojn al la gazetaro, la ĉefa estis tiu je la eŭropa tago de lingvoj la 26-an de septembro. Ni

profitas de la komunikadcentro de Bruselo serĉante aktualajn temojn.

En la romanda gazetaro aperis pluraj interesaj artikoloj pri esperanto danke al Claude PIRON kaj Mireille GROSJEAN. Ni ricevis kopiojn el *Tribune de Genève*, *Le Courrier*, *Femina*. Ankaŭ *Neue Luzerner Zeitung* publikigas informojn pri esperanto verŝajne pro la agemo de la loka societo. Supozeble aperis pli da artikoloj en aliaj gazetoj. Ni ree petas sendi al ni eltranĉaĵon.

Pli kaj pli da interesatoj malkovras esperanton per interreto, konsultante la diversajn hejmpaĝojn. Ili petas informojn aŭ helpon por lerni esperanton. Alia grupo estas lernantoj aŭ gimnazianoj, kiuj elektis esperanton por verki prelegon aŭ ekzamenlaboron. Ofte ili sendas enketilon, kies respondado estas temporaba. Ni respondas al tiuj informpetoj senkoste kaj serioze, en la espero, ke tiuj studlaboroj estos sukcesaj. Instruistoj kaj klasoj aŭdas tiel pri esperanto kaj ni aŭdis, ke la sinteno estas ĝenerale pozitiva.

Bone funkcias la interna informado per la bulteno *SES informas*, kiu aperis 5-foje. Ni esprimas nian sinceran dankon al la redaktoro, kiu senlace kolektas kaj verkas informojn, tajpas kaj enpaĝigas tekstojn, multobligas kaj dissendas la bultenojn. Li faras enorman

laboron, preparante ankaŭ la jubilean jaron.

Varbado

Bedaŭrinde ni ne sukcesis krei agadgrupojn en Alemanio kaj Romandio, kiuj pretus disdoni varbilojn surstrate. SES disponigus la informilojn kaj repagus la spezojn. Ankaŭ kuraĝaj unuopuloj povus plenumi tiun taskon, kiel montris Mireille GROSJEAN diversfoje. Se vi, kara leganto, kuraĝas kampanji, prenu kontakton kun la prezidanto. Ni devus nepre pli agrese fronti la publikon.

Gazetanoncoj malofte havas konkretan rezulton. Tamen ili atentigas pri esperanto kaj akcelas ĝian prestiĝon. Grave estas trovi taŭgajn revuojn por celita profesigrupo aŭ kun alternativa tendenco. Ni reklamis en jenaj revuoj: *Unikum*, organo de la studentaro de Bern, *Die neue Schulpraxis*, fakrevuo por geinstruistoj, *Zeitpunkt*, magazino por viziuloj.

Konklude ni faris ne sufiĉe, sed nian eblon. Mi deziras, ke ankoraŭ pli da volontuloj kontribuos al la disvastigo de nia lingvo laŭ la slogano de Renato CORSETTI: Pli-vastigu nian komunumon.

Bruno GRAF, prezidanto

Donacoj

Donacoj en Frankoj al SES: Traugott Rinaldo AEBI, Ittigen: 5; Yvonne AEBY, Genève: 10; Anita ALTHERR, Bernex: 25; Maryse BAUDAT, St-Prex: 15; Arthur BAUR, Zürich: 20; David BUHLMANN, Prilly: 30; Alessandro CALAPRICE, Allschwil: 30; Peter ELMER, Zürich: 15; Walter GIANNINI, Zollikerberg: 65; Ernst GLÄTTLI, Brugg: 15; Marguerite JACCARD-BESSON, Rolle: 20; Alois KOLLER, Zürich, 65; Dominique MARGUERAT, Dommartin: 25; Kapitano PARZIVAL, Biel: 20; Mady Lynn REYMOND, Neuchâtel: 45; Christiane SIXTUS POT, Perly: 36; Heinz W. STRASSER, Feldmeilen: 30; Mireille & Lucien VAUCHER-VERSTRAELEN, Martigny: 20; Marguerite VIREDAZ, Lausanne: 20; Annemarie WAGNIERE, Lausanne: 15; Suzanne WANNER, Plan-les-Ouates: 25; Henri WETTSTEIN, Versoix: 15; Sume: 566.

Donacoj en Frankoj por la "Agado 2003": Anonima: 250; Françoise BADOUX, Lausanne: 20; Jeannine JEANNERET, Neuchâtel: 25; Jeanne MAMIN, La Tour-de-Peilz: 50; Sume: 345.

Nome de SES la kasistino Elisabeth LAUPER kaj la redaktoro Claude GACOND dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco.

-oOo-

Jarkalkulo 2001 Buĝeto 2003

Elisabeth Lauper, SES-kasistino, januaro 2003

(skanaj reproduktaj)

Elspezoj	Kalkulo 2002	Buĝeto 2002	Budget 2003
Informado, varbado	3'975.75	4'600.00	4'295.00
Omagoj, laborrimedoj		100.00	100.00
Subvencioj, premioj, projektoj	650.00	1'000.00	1'000.00
Literatura Foiro			
SES informas elspezoj	1'664.35	2'000.00	2'000.00
Kunvenoj kaj kunsidoj (GK, estrara, regionaj)	477.00	1'500.00	700.00
Intershanjho servo (Dieter Rooke)		50.00	50.00
Argus	484.25	500.00	
Abono al revuoj	150.00	115.00	150.00
UEA Kotizo	121.70	130.00	130.00
Administrataj kostoj (afrankado, telfonkostoj, etc)	298.50	800.00	500.00
Bank kaj poshtspezoj	49.60	200.00	200.00
Donaco al KCE	225.00		450.00
Diversajho	817.60	200.00	200.00
Redaktado perkoresponda kurso germanlingve			5'000.00
Elspeza sumo	8'913.75	11'195.00	14'775.00

Enspezoj	Kalkulo 2002	Buĝeto 2002	Budget 2003
Membrokotizoj	-3'994.70	-5'700.00	4'000.00
Abono al SESi sen membreco	-395.00	-500.00	400.00
Donacoj, heredjho	-3'096.60	-2'000.00	2'500.00
Agado 2003	-470.00	-500.00	500.00
Argus enspezoj			
SES informas enspezoj	-375.00	-375.00	375.00
Bank kaj poshtinterzoj	-1'595.45	-2'120.00	2'000.00
Diversajho			
Enspeza sumo	-9'926.75	-11'195.00	9'775.00

Malgajno(+) Gajno(-)

-1'013.00

Investo 2003

5'000.00

Librotenado 2002	01.01.2002	31.12.2002
AKTIVOJ		
Kaso	267.00	7.70
Poshtkonto	1'711.05	589.55
Kunranta sparkonto CS-ZH -40	359.30	11'001.50
WIR banko	38'818.55	33'707.75
Kasobligacioj CS-ZH	25'000.00	15'000.00
KCE favore SES	15'000.00	15'000.00
UEA konto sesa-v	114.00	-25.10
Inventaro	1.00	1.00
Ant. imp. bonhavo ce ESV	315.55	315.55
Transaj aktivoj	1'097.60	79.00
AKTIVA SUMO	82'684.05	75'676.95
PASIVOJ		
Transaj pasivoj	-3'007.15	
Kapitalo	-55'069.50	-54'459.50
CDELI - Claude Gacond	-11'139.60	-6'256.65
Agado 2003	-13'467.80	-13'947.80
PASIVA SUMO	-82'684.05	-74'663.95

Gajno(+) Malgajno(-)

1'013.00

Raporto de la kaskontrolantoj

(Letero skane reproduktita)

SVISA ESPERANTO-SOCIETO

Raporto de kaskontrolantoj por la jaro 2002

Ni, subskribintoj, Dieter Rooke kaj Christiane Sixtus, kunvenis kun la kasisto Elisabeth Lauper, la 8an de februaro 2003 en Biel/Bienne por kontroladi la librotrenadon.

La saldoj de la jaro 2001 estas ĝuste transskribitaj kaj la kontrolitaj ciferoj kongruas kun la pruviloj.

Anstataŭ la CHF 5'700 buĝetitaj, la membrokotizoj atingis nur CHF 3'994.70. Tio estis kaŭzata de la ŝanĝo de la kotizsistemo kiu ne permesis antaŭvidi precizan sumon.

La konto Kasobligacioj CS-ZH ŝanĝiĝis de CHF 25'000 al CHF 15'000. Oni retrovas la CHF 10'000 en la kuranta sparkonto CS-ZH.


En la buĝeto 2003 troviĝas investo de CHF 5'000 por redaktado de perkoresponda kurso germanlingve. Eble SES povus pli ofte subteni tiajn valorajn projektojn.

Ni kore dankas nian kasiston Elisabeth Lauper por la tre bone farita librotrenado. Ni proponas al la Ĝenerala Jarkunveno aprobi ĝin (kun profito de CHF 1013,00) kaj la bilanco 2002, kaj malŝargi la kasisto kaj la estraro.

Biel, la 8an de februaro 2003

Kaskontrolantoj :

Christiane Sixtus



Dieter Rooke



Centjara jubileo de la fondo de
Svisa Esperanto-Societo
kaj de la esperantiĝo de la pioniroj
Hector HODLER kaj Edmond PRIVAT

Festa jubilea tago

Sabaton 27-an de septembro 2003

Festa kunveno

10h00-11h00: Rendevuo ĉe la haveno Ouchy /Lausanne atingebla el la stacidomo Lausanne per la subtera funikularo Metro.

11h00: Ŝipa foriro el Ouchy. Surŝipa festa aperitivo memore al la fondo de SES far esperantistoj de Lausanne kaj de aliaj lemanaj urboj.

12h10: Ŝipa alveno en Rolle. Promeno kaj grupa fotado borde de la lago.

13h00: Tagmanĝo en la havena restoracio "Casino".

Salutaj mesaĝoj. Rememoraj vortoj pri la fonda kunveno de SES je la 27-a de septembro 1903. La signifa rolo kultura de la najbara vilaĝo Gland, loĝloko de niaj verkistoj Edmond PRIVAT kaj Claude PIRON.

15h30: Promeno en la urbo rigarde al ekspozicio pri esperanto videbla ĉe montrofenestroj magazenaj.

16h00: Konkludaj vortoj ĉe la stacidomo.

16h21: Trajna foriro al Lausanne.

16h53: Alveno en Lausanne.

17h00: Adiaŭa teumo ĉe la stacidoma bufedo.

Kunlaborantaro.

Por la organizo de tiu festa kunveno helpas al Claude GACOND ne nur anoj de SES, sed ankaŭ de la esperanto-grupoj de Lausanne kaj Genève, kaj en Rolle mem Marguerite JACCARD kaj en la najbara Gland Claude kaj Nicole PIRON.

Detala programo.

Detala informilo kun programaj precizigoj kaj aliĝilo akompanos la venontan numeron 2003-3 (maja-aŭgusta) de *SES informas*.

Pluraj festaj jubileaj tagoj.

Ekde tiu unua festa jubilea tago en Rolle de la 27-a de septembro 2003, dum la tuta jubilea jaro, do ĝis la 27-a de septembro 2004, organiziĝos kelkaj aliaj festaj jubileaj tagoj, kiuj rememorigos aliajn karakterizajn trajtojn de la aktiveco de SES-anoj dum unu jarcento.

Kulturaj Internaciaj Semajnoj.

Ĉiun festan tagon ĉirkaŭos Kultura Jubilea Internacia Semajno (KJIS) ĉiam organizata de CDELI en La Chaux-de-Fonds. Per tiuj KJIS niaj festaj jubileaj tagoj akiros internacian karakteron.

Programo de la unua Kultura Jubilea Internacia Semajno.

Vendredon 26-an de septembro: Alveno en La Chaux-de-Fonds de la partoprenantoj al la Kultura Jubilea Internacia Semajno kaj konatiĝa vespero ĉe CDELI.

Sabaton 27-an de septembro:

08h16: Trajna forveturo el La Chaux-de-Fonds.

09h33: Alveno en Lausanne.

10h00: Alveno en Ouchy por partopreni la jubilean festan tagon.

17h17: Revena forveturo el Lausanne.

18h07: Alveno en Neuchâtel.

Vespermanĝo ĉe la haveno en la restoracieto "Au Débarcadère".

20h11: Forveturo el Neuchâtel.

20h42: Alveno en La Chaux-de-Fonds.

Bonan nokton!

Dimanĉon 28-an kaj lundon 29-an de septembro:

Ĉe CDELI: Konatiĝo kun la verkaro kaj vivo de Edmond Privat kaj renkonto kun Claude Piron.

Mardon 30-an de septembro:

Ekskursa tago al la pasejo La Tourne kaj al la belvidejo Tablettes.

Merkredon 1-an de oktobro:

En la vilaĝo Les Brenets: per ekspozicieto kaj prelego s-ro DELEGLISE malkovrigos al ni la buntan personecon de la esperanto-pioniro Edouard DUCOMMUN, kiu iniciatis interlernejan korespondadon jam en 1903. Renkonto kun Mireille Grosjean kaj promeno pieda kaj ŝipa al la akvofalo Le Sault du Doubs.

Ĵaŭdon 2-an de oktobro:

Ĉe CDELI: Konkluda adiaŭa kunsido.

Parta partopreno.

Detala informilo pri tiu KJIS kun programaj precizigoj kaj aliĝilo ankaŭ akompanos la venontan numeron 2003-3 (maja-aŭgusta) de *SES informas*. Kiuj ne povos liberiĝi por partopreni la tutan aranĝon, tiuj povos libere partopreni elektitan parton de la programo.

Jam nun rezervu la koncernenan periodon en via agendo!

Claude GACOND.

Utiligu la SES-pagilon por donaco favora al la jubileaj aranĝoj, indikante la celon "Agado 2003" aŭ "Jubileo"

La modo ŝanĝiĝas, sed ne la deziro kune ekskursi babilante en esperanto.



**Edmond PRIVAT 18-jara meze de ekskursantoj al La Tourne en 1908.
Li staras malantaŭ la viro, kiu apogas sin sur bastono.**

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
☎ 032 967 68 55.

Fakso: 032 967 68 29, indiki: por CDELI.

Retadreso: CDELI.VCH@ne.ch
martine.schneller@ne.ch
claudEGACOND@ne.ch
nancy.fontannaz@ne.ch

Studsabatoj didaktikaj ĉe CDELI

Sub la gvido de Claude GACOND, Nancy FONTANNAZ kaj Stefano KELLER didaktikaj stud-sabatoj okazantaj preskaŭ ĉiumonate ĉe CDELI alportas utilan helpon al la lernantoj kaj instruantoj de esperanto. Tial ilia frekventado estas konsilinda al ĉiuj studemuloj. Kiu volas progresi en la praktiko de esperanto, tiu rezervu la sekvajn sabatojn: **martes 15 por studi kun Monika MOLNAR kaj Stefano KELLER, marte 24: Ed BORSBOOM el Utrecht prelegos pri la kaŝita vivo de Andreo CSEH, la komencantoj studos kun Stefano KELLER.** (Atentu pri la ŝanĝo de la dato de la maja studsabato), junio 21.

Por minimuma kovro de la elspezoj estas petata partoprenkotizo de F 10.- Senpage por JES-anoj. (Maje estos petata partoprenkotizo de F 20.- al la aŭskultantoj de Ed Borsboom.)

Aliĝo

Por faciligi la organizon de la aranĝo la partoprenontoj bonvolu ĉiam letere, rete aŭ telefone anonci sian aliĝon al Claude GACOND: Esperanto, CP 5031, 2305 La Chaux-de-Fonds 5. Rete: gacond@bluewin.ch. ☎ 032 926 52 32 aŭ 032 967 68 55.

Horaro

9h30: Malfermo de la CDELI-salono: eblo aĉeti brokantajn kaj novajn librojn.

11h00: Oficiala malfermo kaj formiĝo de la stud-grupoj. 11h45: Kafuma paŭzo. **12h00: 2-a stud-periodo.** 12h45: Kuna iro al la najbara italeca restoracio ItalPanini, Serre 25, por la komuna tagmanĝo. **14h30: 3-a stud-periodo.** 15h15: Teuma paŭzo. **15h30: 4-a stud-periodo.** **16h15: Konkludo de la renkonto** en la CDELI-salono, kie eblas resti por teumi, babilu, akiri librojn ĝis la propra forirmento. **17h30: Oficiala fermo.**

Enirejo al la CDELI salono

3-a pordo nord-orienta de la biblioteka domo, kiu estas ŝlosita sabate. Alvenantoj premu la sonorilan butonon, kiu troviĝas maldekstre de tiu pordo, kaj iu tuĝ venos.

Por atingi la bibliotekon

El la stacidomo: La biblioteko situas ĉe la strato Progrès N° 33. El la stacidomo ĝi atingeblas per la buslinio 4, direkto "Hôpital". Bileto akireblas en la buso mem. Petu la haltejon "Bibliothèque".

Aŭtomobile: Aŭtomobilantoj ne parku sian veturilon en la biblioteka korto, sed en la najbaraj stratoj. Ekde la urba enirejo videblas indikiloj konduke al la biblioteko.

Raporto

La januara kaj februara studaj sabatoj kunvenigis po 12 lernemulojn.

Januare ĉiuj laboris kun Claude GACOND. La matenon dum la komencantoj laŭtlegis ŝercojn, la progresantoj ludis la rolon de interpretistoj, kies tasko estis traduki la kernajn frazojn en diversajn esperanto-dialektojn. Tiuj ĉi reliefigis precizajn gramatikajn karakterizojn. Ĉiuj tiel malkovris la esprimriĉecon de esperanto kaj povis precizigi siajn lingvo-konojn. Kaj la posttagmezon paroligaj ludoj efektividigis grupojn diskutigis ĉiujn. La tempo fluas tro rapide, konkludis pluraj babilemuloj dum la adiaŭa teumo.

Pri la februara renkonto tiel raportas Charlotte BLANC: *"Sabaton la 15-an de februaro kun unu dekduo da personoj mi partoprenis unu praktikan kurson de esperanto en CDELI. Ĉu vi scias, ke ekzistas tre interesa perkoresponda kurso por ĉiuj? Unu fojon en la monato kelkaj lernantoj kuniĝas por lerni pli bone kun s-roj GACOND kaj KELLER kaj s-ino FONTANNAZ. Dum tiu tago ni travivis plurajn instruplenajn horojn. Ni estis 2 grupoj, komencantoj kaj progresantoj, ĉiuj estis tre atentaj. Estis tre interese por ĉiu grupano esti en kontakto kun aliaj perkorespondaj lernantoj. Por bone progresi kaj kleriĝi estas necese esti konvinkita, ke nia lingvo estas bezonata en la mondo. Ni esperas, ke multe pli da homoj ekkonscios pri tio kaj lernos esperanton. En 2003 ni festos 100 jarojn de esperanto en Svislando. Estas granda okazo por paroli pri tiu mirinda instrumento por pli bone komuniki."*

Dum fakte la progresantoj efektividigis strukturŝanĝajn ekzercojn kun Claudé GACOND en la CDELI-salono, la komencantoj laboris kun Stefano KELLER en la salono Charles HUMBERT. La observo de la fresko de tiu pentristo kondukis al utilaj paroligaj situacioj.

Novembre multaj entuziasmiĝis en kontakto kun la hungara pedagogino Monika MOLNAR. Ŝi reinstruos la sabaton 15-an de marto. Do ĝis baldaŭ ĉe CDELI.

Fruktodona kunlaboro

Benno FRAUCHIGER, la prezidanto de JES (Junularo Esperantista Svislanda), esprimis al la civilistaj instancoj la deziron povi konkludi en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds profite al CDELI la 44 lastajn tagojn de sia civil-servo. Lia peto estis akceptita kaj tiel en januaro kaj februaro CDELI ricevis lian utilan helpon. Kiel juna inĝeniero, Benno FRAUCHIGER kompetentas pri komputiko. Kaj nun dank'al li CDELI disponas pri tri komputilaj sistemoj ege utilaj. a) Katalogo de la "Libro-Servo de Esperanto perkoresponde" tiel povos resti daŭre aktuala. b) Ekde nun ekzistas eblo interrete konigi la situacion de la periodaĵoj en posedo de CDELI. c) Efektiveblas registro de konindaj artikoloj aperintaj en la esperanto-periodaĵoj.

Krome Benno FRAUCHIGER tre helpeme kontribuis al la ordigo de la libro-kolekto de CDELI kaj al arkiv-

igo de korespondaĵoj ricevitaj de Clara KREIS-SCHNEEBERGER, denaska idistino.

Je la fino de sia helpservo Benno FRAUCHIGER anoncis, ke oni povas nombri lin inter la kunlaborantoj de CDELI. Tiel riĉiĝis CDELI je nova helpema fakulo pri komputiko, kies servoj tutcerte estos utilégaj.

Kaj la deĵoro de la civilisto Benno Frauchiger eble instigos aliajn civilistojn peti, ke ilia servo povu utili al CDELI. Benno FRAUCHIGER povis konvinkiĝi, ke abundo da utila laboro estas efektivebla profite al tiu arkivejo, kie miloj da leteroj kaj interesaj dokumentoj atendas esti arkivigitaj por fariĝi konsulteblaj de esploremuloj.

Sed ne nur civilistoj estas utilaj. Bonvoluloj pretaj dediĉi parton de sia tempo al plenumo de arkiviga tasko ĉiam estos bonvenaj, des pli ke ekde la pasinta aŭtuno CDELI disponas pri propra komputila arkiviga sistemo bone harmoniigita kun tiu de la biblioteko mem. La sola diferenco estas, ke la lingvo esperanto anstataŭas la francan, ĉar montriĝis, ke la plimulto el la esploristoj vizitantaj CDELI-n ne regas la francan, sed bone esperanton, eĉ se iliaj esploroj koncernas aliajn planlingvojn.

Kio devas esti la kapablo de helpanto preta deĵori favore al la arkivigo de korespondaĵoj aŭ aliaj trezoroj: a) ĉefe konvena regado de esperanto, b) akcepti labori obeante al precizaj labornormoj propraj al la biblioteka aktiveco, c) esti preta dediĉi

al la koncerna deĵoro sufiĉe da tempo, ĉu sub la formo de regula reveno al CDELI aŭ de dediĉo de plursemajna laborperiodo, kaj ĉ) ne atendi salajron por la plenumita laboro. Ĉiuj kunlaborantoj de CDELI estas bonvoluloj nesalajritaj.

Kiu sin sentas preta kreskigi la nombron de tiuj bonvoluloj, tiu ne hezitu veni proponi sian helpon.

Claude GACOND



junularo esperanta svislanda
jeunesse espérantophone suisse
junges esperantio schweiz
gioventù esperantista svizzera
giuventetgna esperantista svizra

Postfach 3324, 4002 Basel

Telefon-numero: 061 301 2705

info@jesperanto.ch

www.jesperanto.ch

Prezidanto: Benno FRAUCHIGER

Sekretario: Joëlle GROSJEAN

Svisa Vintra Semajnfino sukcesega

Dum la ĉi-jara Svisa Vintra Semajnfino (SViS.03), de la 21-a ĝis la 23-a de februaro, 14 junuloj esperantlingvaj kuniĝis en etoskrea

domo en Prés-d'Orvin por kelkaj belveteraj kaj amuzplenaj tagoj. Pro la abunda neĝo ne eblis atingi nian domon aŭte, do ĉiuj devis tranĝiri piede kelkcent metrojn da vojo por atingi la domon. Tiu-ĉi estis tiel frosta en la komenco, tial ni devis atendi ĝis sabato matene por havi fluan akvon ankaŭ en la lavejo kaj necesejo. Sed la lignofajroj en la kuirejo kaj en la salono jam vendrede bone varmigis nin kaj nian vespermanĝon preparitan de Stefanie HANISCH. Ludante jason, skrablon kaj aliajn ludojn ni malfrue finis la vesperon.

Sabate ĉiuj sledis aŭ skiis sur la sledvegoj aŭ skiadejoj rekte atingeblaj el nia domo. Najbaro, al kiu ni helpis elneĝigi lian survoje blokitan aŭton, dankeme alportis al ni kelkajn botelojn da blanka vino, kiuj bone aldoniĝis al nia vespera fonduo.

Poste ni multe ridis dum la kreado de fotoromano pri la "anonimaj esperantistoj" elpensita de Henri DE SABATES. Dimanĉe ni ankoraŭ skiis, sledis kaj neĝumis antaŭ ol purigi nian domon.

Fine de la posttagmezo la aro da krokodilemuloj kontente suben-iris por hejmenveturi Svisien, Francien, kaj Germanien.

Benno FRAUCHIGER

Kunvenprogramo

Aprile 16-22: Savona (IT): 27-a Internacia Junulara Festivalo (IJF) organizita de Itala Esperantista Junularo.

Maje 17: Printempa Tago de JES.

Julie 19-26: 59-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Lesjöfors, (SE).

Oktobre 25: Ĝenerala Asembleo de JES.

KCE

Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
☎ kaj fakso: (032) 926 74 07.
kce.esperanto@bluewin.ch

Programo

Marte 29: Ekde 09h30: Ĝenerala Asembleo de KCE.

Marte 29-30: La historia rolo de Ivo LAPENNA. Enkondukaj vortoj de prof. Carlo MINNAJA per prezento de la verko "*Eseoj memore pri Ivo LAPENNA*". Partoprenos s-ino Birthe LAPENNA. Studrondo por progresantoj kun Perla MARTINELLI.

Aprile 17-21: 5-a PIK – Plurnivela Internacia Kursaro (printempa sesio). Komencita grado kun hungara instruist(in)o. Progresiga grado kun Giorgio SILFER, laŭ *Esperanto 2* de

István SZERDAHELYI. Perfektiĝa grado kun Perla MARTINELLI, laŭ *Paŝoj al plena posedo* de William AULD.

Maje 24-25: Socia Esperanto-Forumo: kiaj perspektivoj en Eŭropo? Enkondukos Kristian GARINO, aktivulo en Florenco, federalisto.

Julie 5-12: Grindelvalda Naturarmika Semajno, antaŭkongresa aranĝo al la SAT-Kongreso. Gvidos Francisko DEGOUL

SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud EGGENBERGER, Wurmbühlstr. 10
8405 Winterthur ☎ 052 233 47 64
gertrud.eggenberger@bluewin.ch

Ĝenerala Kunveno

La ĝenerala kunveno de SAEF okazos en Basel, Riehenring 129, la 5-an de aprilo je la 10.00 horo, antaŭ la jarkunveno de SES. Jen ĝia tagordo:

1. Saluto.
2. Protokolo de la pasintjara ĝenerala kunveno.
3. Jarraporto de la estraro pri 2002.
4. Raporto de la kasisto kaj revizoroj.
5. La estonto de SAEF.
6. Elekto de la estraro.
7. Elekto de revizoroj.
8. Buĝeto por la jaro 2003.

9. Membrokotizoj por 2003.
10. 55-a IFEF-Kongreso en Dresden.
11. Elekto de delegito por VKES.
12. Proponoj.
13. Jara programo.
14. Diversaĵoj.

Interesatoj pri la aktiveco de SAEF estas bonvenaj.

Gertrud EGGENBERGER

UEA


Ĉefdelegito en Svislando

François RANDIN
Av. de Chailly 10, CP 115,
1000 Lausanne 12.

Tel. +41 76 411 14 55, fakso +41 21 657 14 56.

Radio

Mireille GROSJEAN aŭdis, ke *Radio suisse romande* la mardon 28-an de januaro en sia unua programo pri aktualaĵoj, raportante pri la kontraŭdavsosa manifestacio en Porto Alegre, diris je 12h40: "*On y trouve un stand qui fait la promotion de l'espéranto.*"



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel, ☎ 0049 76 214 57 12

Kunvenoj: 20h00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Venontaj kunvenoj

Marte 27: Ludvespero: ni ludos skrablon.

Aprile 5-6: Kultura Trilanda Renkontiĝo kaj SES-kunveno. (Vidu la informojn komence de "SES informas".

24: Lumbildoj pri Sicilio.

Maje 22: Invito ĉe Berthe SPALINGER.

Junie 26: Minigolfo en "Grün 80".

Aŭguste 24: Ekskurso.

Septembre 25: Ĉiu rakontas pri siaj ferioj.

Oktobre 23: Invito ĉe la familio BEROUD-FOCKE.

Novembre 27: Programo 2004.

Bern

Prepara kunveno

La 22-an de februaro okazis kunsido prepara en Bern cele al la preparo de forumo en septembro. Tiun ĉi kunsidon ĉeestis nome la SES-prezidanto

Bruno GRAF kaj Mireille GROSJEAN, kiuj donis sian retadreson por estis informataj pri la porforumo aktiveco. Ĉeestis entute sesdeko da personoj el buntaj horizonoj, kiuj penis organizi tradukon, ĉar kune kunsidis alemanoj kaj romandoj. Najbaro de Mireille aŭdinte pri esperanto tuj asertis: "*Tion ni fakte bezonas!*" Mireille disdonis informilojn kaj poste anoncis pretecon organizi prelegon pri esperanto.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Espéranto-infos: ☎ 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio «Aux Cheminots», 7, rue des Gares, Genève. Komuna vespermanĝo ekde la 19-a horo.

Venontaj kunvenoj

Aprile 1: Ĉie en la mondo la unua de aprilo estas ŝerca tago. Sed nia kunveno tamen okazos.

Ĉiusemajne okazas renkontoj paroligaj:

Konversacia kurso kun Claude PIRON la ĵaŭdon de la 12-a horo ĝis la

13h-a, ĉe Maison du quartier,
Plainpalais, 1 rue de la Tour.

Esperanto-babilado la lundon ekde la
18a horo 30, ĉe Restoracio Les
Cheminots, rue des Gares 7.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 389, 1009 PULLY

☎: 021 729 58 02

<esperanto@isuisse.com>

<http://www.esperanto.ch>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan
lundon de la monato je la 20h00.

Diskuta rondo: ĉiun trian lundon kun François
RANDIN, en Chailly-Lausanne. Bonvolu telefone
voki lin antaŭe 076 411 14 55.

Venontaj kunvenoj

Aprile 7, Maje 5. Junie okazos
ekskurso.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

☎ 041 280 46 12.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas
ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswil-
strasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de
Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2
kaj la fervojo. (Dè norde eblas veni aŭtobuse de
Beromünster-Rothenburg.)

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom
aŭgusto kaj oktobro - konversacia rondo de la
14h00 ĝis la 16h00 kun Franz BRÜGGER en la
restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

Jarraporto

Malfacila jaro

La pasinta jaro 2002 estis tre
eventoplena. Aprile ni povis festi
jubileon kaj en aŭtuno ni priplendis
la morton de Anĝelo MELLINI la 10-
an de septembro kaj de Carla
MÜLLER la 12-an de novembro,
ambaŭ longjaraj LES-anoj. Ambaŭ
entombigojn partoprenis deko da
LES-anoj. De Ruth MELLINI ni
ricevis la esperanto-libraron de
Anĝelo, el kiu Franz BRÜGGER je
ĉiu kunveno alportas kelkajn disdon-
otajn librojn. Samtempe eblis nek
gajni, nek pluteni junulojn, ĉar
Maurus BRÜLISAUER pro studado
en Zürich ne povas plu aktivi ĉe ni
kaj fine de la jaro Giuseppe
CASTELLI translokiĝis al Paradiso
(TI). Plue pro malsano aŭ
handikapo ne povas partopreni niajn
kunvenojn Luciano ORTELLI, Reny
SÜSS, Karlota ECKLIN kaj pro aliaj
kaŭzoj neniam aperas Rosmarie
BUCHER. Fine malregule montriĝas
Renata FILALI, Kony REY kaj
Monika RUCKLI pro aliaj okupoj.
Kaj plue Margrit E. BRÜGGER loĝas
en Reinach kaj Gudrun IMFELD en
Lungern. Do restas ok veraj geaktiv-
uloj. Tial venis al la estraro la ideo
malpliigi la nombron de niaj kun-
venoj. Post tiuj negativaj konstatoj
notindas kompreneble ankaŭ
pozitivaj okazintaĵoj.

Kunvenoj

La 6-an de aprilo precize 75 jaroj post la fondiĝo de Esperanto-Grupo en Luzern, ni solene festis nian jubileon, cetere kadre de la ĝeneralaj kunvenoj de SES kaj de SAEF. Partoprenis kontentiga nombro de esperantistoj el Svislando. Pri tiu jubileo aperis artikolo en *Neue Luzerner Zeitung* kaj ankaŭ Radio-Regionjournal Zentralschweiz kaj Teletell raportis.

Ni renkontiĝis 8 fojojn en nia kunvenejo ĉe la restoracio Emmenbaum. Kune kun la ekskurso kaj la promenado nombriĝis meze ĉirkaŭ 7 partoprenantoj de LES kaj unu gasto, nome Dieter ROOKE, kiu prelegis. Krom la lia, ĉiuj programeroj estis realigitaj de niaj membroj.

En la restoracio Simplon Franz BRÜGGER gvidis 10 konversaciajn rondojn. Li ankaŭ ĉiam paroligis nin komence de la kunvenoj en la restoracio Emmenbaum.

La estraro kunsidis kvin fojojn.

Kursoj ne okazis. Junie en *Neue Luzerner Zeitung* aperis artikoleto titolita "No English? No Job" al kiu Benno FRAUCHIGER, la prezidanto de JES, respondis la saman monaton en la rubriko *Forum*.

Sonja BRUN, kiu forlasis la funkcion de UEA-ĉefdelegito, vojaĝis por ni al la kunveno de aktivuloj en Bern kaj al La Chaux-de-Fonds por la Ĝenerala Asembleo

de KCE. Ŝi kaj Annelies DETTLING kaj Margrit SCHERER vizitis la Zamenhoffeston en Basel. Koni REY, la ĉi-loka UEA-delegito, ricevis kelkajn pet- kaj demand-skribojn, kies kopioj troviĝas en niaj aktoj. Kelkaj LES-anoj partoprenis la du GERI-rondojn de SAEF en Rotkreuz.

Laŭ la raporto de Paul SCHERER

Venontaj kunvenoj

Konversacia rondo de la 14-a horo ĝis la 16-a kun Franz BRÜCKER en restoracio Simplon la 7-an de majo, 2-an de julio, 3-an de septembro, 5-an de novembro kaj 7-an de januaro 2004.

Kunvenoj:

Aprile 2: 14h00: Konversacio kun Franz BRÜGGER; 14h30: Travivaĵoj en Japanio kun Ernst GLÄTTLI.

Junie 4: 14h00: Konversacio kun Franz BRÜCKER; 14h30: Pri la insuloj de Brisago kun Annelies DETTLING.

Aŭguste 9: Ekskurso anoncota.

Oktobre 1: 14h00: Konversacio kun Franz BRÜGGER; 14h30: Distraĵoj kun Paul SCHERER.

Decembre 3: Zamenhofa festo. 14h00: El la verkaro de Zamenhof kun Paul SCHERER; 14h30: Kompilado de la programo 2004.

Kantono de Neuchâtel

Les Brenets

Dimanĉon matene 19-an de januaro Mireille GROSJEAN, irante al la bakejo, renkontiĝis kun s-ro DELEGLISE, la historiisto de la vilaĝo. Tiu ĉi fiere anoncis al ŝi, ke li estis ĵus ricevinta 17 interesajn kajerojn verkitajn de la esperanto-pioniro Edouard DUCOMMUN. Li menciis, ke en ili multo rilatas al esperanto. Tiujn ĉi dokumentojn donacis al li posteuloj de la familio DUCOMMUN, kiuj loĝas en Francio inter Annecy kaj Le Bourget kaj kiuj konas liajn genepojn ankaŭ loĝantajn en Francio.

La merkredon 26-an de februaro Mireille GROSJEAN kaj Claude GACOND havis la okazon ekzameni tiujn ĉi kajerojn ĉe s-ro DELEGLISE. Montriĝas, ke ili tutcerte alportas interesajn informojn pri la vivo kaj la aktivecoj de Edouard DUCOMMUN. Tial decidiĝis, ke kiam s-ro DELEGLISE estos inventoriinta la enhavon de tiuj kajeroj, tiam li rekontaktos kun Claude GACOND por vizito de CDELI por fotokopia transdono de arkivindaj informoj. Kaj s-ro DELEGLISE pretigos ekspozicion pri la instruisto Edouard DUCOMMUN por prezento al la partoprenantoj al la jubilea renkonto okazonta en Les Brenets la 1-an de oktobro.

La Chaux-de-Fonds Studaj rondoj ĉe CDELI

Dum la lastaj vesperoj ĉiuj alportis kaj klarigis ludojn. Tio kreis tre agrablan paroligan etoson.

Datoj notindaj en via agendo:

**Márte 25, Aprile 01, Maje 06 kaj 20,
Junie 03 kaj 17**

Eniro en la CDELI-salonon eblas ekde la 19h45. **Studo de la 20h00 ĝis la 21h45.** Fermo de la salono je la 22h00. Alvenantoj premu la sonorilan butonon, kiu troviĝas maldekstre de la enirpordo al CDELI. (Nord-orienta pordo de la Biblioteko Domo).

Claude GACOND.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70, 9500 Wil.
☎ 071 911 68 30

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Sântisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

Venonta kunveno

Aprilo 2: Kio estas SAT kun Stanislaw POCHANKE, okaze de la 76-a SAT-Kongreso okazonta de la 12-a ĝis la 19-a de julio en La Chaux-de-Fonds.

Majo 7: 50 jarojn de Grezijono, kun Stanislaw POCHANKE.

Aŭgusto 11 (dimanĉe): Tuttaga ekskurso al Bergli Fuchsacker. Informoj ĉe Verĉna CHAVES-WALDER. Tel. 071 393 41 49.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 ZÜRICH
☎ 01 251 50 25 <info@esperanto.ch>

Kunvenoj regule la duan sabaton de la monato matene je la 11h00 kun komuna manĝo en Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich.

Venontaj kunvenoj

Aprile 12: Kunveno kun manĝego: Prezento de la nova *Mondlingva Vortaro germana-esperanta kaj esperantagermana*.

Maje 1: Dieter ROOKE intencas starigi surstratan standon kun informmaterialo pri esperanto. Li serĉas kunlaboremulojn.

10: Kunveno kun manĝego.

De la ĵaŭdo 29-a ĝis la dimanĉo 1-a de junio: Internacia Seminario pri 100 jaroj bahaa religio kaj esperanto-movado en Svislando.

(Vidu la aldonitan informilon, en kiu vi trovos la aliĝilon).

Resuma programo:

Ĵaŭdon 29-an:

14h00-15h00: Alveno.

15h00: Malfermo.

16h15-18h00: Unua laborrondo: Tekstoj en la sanktaj skriboj de la bahaanoj pri universala lingvo ĝenerale kaj pri esperanto specife.

16h30: Komuna vespermanĝo.

20h00: La bahaa koruso de Zürich prezentas spiritajn kaj aliajn kantojn el

la tuta mondo en esperanto kaj en aliaj lingvoj.

Vendredon 30-an:

09h00-10h15: Dua laborrondo: La religia sinteno ĉe L. L. ZAMENHOF, Lidja ZAMENHOF kaj Marta RUTH. Iliaj vizitoj en Svislando.

10h45-12h15: Kontaktoj de PRIVAT, FOREL kaj BOREL kun Lidja ZAMENHOF kaj Marta RUTH kaj aktivecoj de Fritz SEMMLE en orienta Svislando.

12h30-14h00: Komuna tagmanĝo.

14h00-18h00: Vizito de zurikaj lokoj signifaj por la esperanto-historio.

18h30-20h00: Komuna vespermanĝo.

20h00: Spektakla vespero: Orientalaj dancoj kaj prezento far Jan Stanislaw SKORUPSKI de kantitajn sonetojn.

Sabaton 31-an:

09h00-12h15: Kvara laborrondo: Komunaj trajtoj inter la bahaa kaj esperanta movadoj.

10h45-12h15: Kvina laborrondo: La esencaj diferencoj inter la bahaa kaj esperanta movadoj.

12h30-14h00: Komuna tagmanĝo.

14h00-15h30: Sesa laborrondo: La aktivecoj de la bahaanoj en la esperanto-movado kaj la aktivecoj de la esperantistoj en la bahaa movado.

16h00-18h00: Sempa laborrondo: Konkludoj: Kion bahaanoj kaj esperantistoj povas komune fari por siaj celoj, kia kunlaboro eblas, eventualaj kunlaboraj limoj.

18h30-20h00: Fondua vespero.

20h00: Spektaklo kun dancoj el Latinameriko kaj prezento far István MOROCZ de la lirika programeto "Paĉjo" pri la granda majstro Julio BAGHY.

Dimanĉon 1-an de junio:

09h30-13h00: Matenmanĝega lunĉo kun paralela konkluda debato pri la seminario.

13h00-14h00: Adiaŭado.

Loko: Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8034 Zürich.

Dietrich M. WEIDMANN.

www.esperanto.ch/kalendaro

Radio LORA

Dieter ROOKE kunlaboras por la pretigo de la esperanto-elsendoj de la alternativa radiostacio LORA en Zürich. Li esperas ricevi la kunlaboron de helpemuloj. Lia adreso: Dieter ROOKE, Äussere Klus 14, 4702 Oensingen.

Morto

Alfred WENGER

(20.07.1917 – 29.01.2003)

Alfred Wenger naskiĝis la 20-an de julio 1917 en La Chaux-de-Fonds en laborista familio. Lia patrino estis horloĝistino kaj lia patro poŝta oficisto. En 1931, kiam li estis 14-jara knabo, lin konsciigis la horloĝindustria krizo pri la sociaj problemoj. Liaj gepatroj alfrontis senlaborecon kaj tial la familio devis migri al Genève, sekve al translokigo de la poŝtista funkcio de la patro.

Tial Alfred daŭrigis siajn studojn en la fama linceo "Collège Calvin" kaj en la Ĝeneva Universitato, kie li doktoriĝis pri medicino. Ĉar lia fratino Colette BONNARD-WENGER patrinis je du beboj, ofte venis el ŝi konsilaj petoj, kiuj fakte ludis decidigan rolon en la profesia orientiĝo de Alfred, kiu iris fakiĝi ĉe la zurika pediatro profesoro

FANCONI. Je la konkludo de sia kuracista formiĝo Alfred WENGER instaliĝis kiel infankuracisto en Neuchâtel.

Pro sia muzikemo la fraŭlo baldaŭ aniĝis al la loka Korusa Societo, kaj estas en tiu medio de ĥoristoj, ke inter la kantantinoj li baldaŭ malkovris en Liliane ECKLIN sian estontan vivkunulon, kiun li edzinigis en 1951 kaj baldaŭ kvarfoje patrinigis.

Liliane estis diplomita instruistino, kiu neniam instruis pro la tiama manko de instruistinaj laborpostenoj. Ŝi estis feliĉe trovinta sekretarian taskon en bonfara organizo protestanta. Tio estis fakte taŭga formiĝo por la funkcio de medicina sekretariino, kiun ekde 1954 ŝi plenumadis en vasta apartamento samtempe rolanta kiel kuracista deĵorejo kaj familia hejmo. Ilia nova loĝejo ĉe strato "Promenade Noire" [Nigra Promenejo] najbaris tiun de la samideanoj Edmond kaj Yvonne PRIVAT-

BOUVIER, kio favoris la reciprokan amikecon, kiu ligis ambaŭ parojn.

La simpatio al la penso de la biografo de Lejzer ZAMENHOF kaj de Mahatma GANDHI manifestiĝas fronte al la anoncilo de la morto de Alfred WENGER, kiu okazis en lia hejmo ĉirkaŭata de familianoj la 29-an de januaro. Tiu diro de Edmond PRIVAT rememorigas, ke *"Notre véritable identité n'est pas notre coquille, mais l'âme universelle qui l'habite."* ["Nia vera identeco ne estas nia konko, sed la universala animo, kiu loĝas en ĝi."]



En la absolute laika ceremonio adiaŭa al la liberpensemulo kaj agnostikulo Alfred WENGER, kiu disvolviĝis kun granda digno en la templo de la vilaĝo Saint-Aubin, Richard ECKLIN-DESSOULAVY, priskribante la personecon de sia bofrato, klare atentigis, ke Alfred kultivis fidelecon en la familiaj kaj interhomaj rilatoj, ke la infankuracisto ĉiam vigle konsciis pri la sociaj problemoj de la pacientoj, kaj ke li estis esperantisto.

Afred WENGER eklernis la lingvon internacian post siaj universitataj

studoj, tuj kiam li instaliĝis en Neuchâtel en 1951. Kaj Lilianne sia-vice ankaŭ ekstudis esperanton. Ambaŭ frekventis kurson de William PERRENOUD, tiam eksperimentanta sian Oran Metodon, Alfred jam en 1951, Liliane en 1952. (Fakte la saman kurson de 1952 mi mem partoprenis kun pluraj studkamaradoj de la porinstruista lernejo "Ecole normale".) Sed pro sia laboriga funkcio de patrino kaj medicina sekretariino Lilianne ne povis same sisteme studi la lingvon, kiel ŝia edzo, kiu entuziasme legadis la beletrajn verkojn, kiuj tiam dinamisme eldonadis en la Kanariaj Insuloj Juan REGULO PEREZ en sia kolekto Stafeto.

Baldaŭ la kunvenoj de Esperanto-Societo Neuchâtel migris de la malcentra privata lernejo Monruzy de René-William PERRENOUD al la pli centra apartamento de Alfred kaj Liliane WENGER kaj estas fakte en la atendejo de la infankuracisto, ke la grupkunvenoj tre regule disvolviĝis sub la prezido de la afabla infankuracisto, ĝis lia emeritiĝo en 1984.

Dum tiuj kunsidoj Alfred kaj Lilianne ŝatis rakonti pri sia aktiva partopreno en tuta serio da Universalaj Kongresoj kaj pri la kursoj de KCE en La Chaux-de-Fonds, kiujn ili regule frekventadis. Kaj ankaŭ la studsabatojn ĉe CDELI ili vizitadis. Estas ĝuste en tiu de junio 2001, kiam prelegis Herbert MAYER, la direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo, ke Alfred anoncis al mi, ke pro malsaniĝo kancera li ne havos plu la forton ĉeesti tiujn interesajn prelegojn.

Je sia profesia emeritiĝo Alfred kaj Liliane WENGER forlasis Neuchâtel por instaligi en dometon super la vilaĝo Chez-le-Bart. Kaj estas tie, ke ekde 1985 la pli kaj pli maljunaj anoj de la esperanto-societo daŭrigis nun posttagmeze siajn rendevuojn, korektante kun granda diligento tradukajn taskojn proponitajn de René-William PERRENOUD, legante fragmentojn de beletraj verkoj, kiujn Alfred ĝue legadis, kaj teumante aŭ eĉ rakledumante sen krokodili. Kelkfoje mi akompanis mian patrinn Gabrielle GACOND, kiu vizitadis tiujn ĉi renkontojn kun renovigita plezuro. Kaj kiam pasintjare montriĝis, ke reale finiĝis la vivo de tiu maljuniĝinta societo, tiam ĝia rest-

anta riĉaĵeto estis al mi transdonita por plua poresperanta aktiveco. Ĝi faciligis la kreon de la libro-servo profite al la perkorespondaj studentoj de esperanto.

La dokumentoj, kiujn Alfred jam donace alportis al CDELI okaze de sia translokiĝo al Chez-le-Bart kaj kiujn Lilianne ĵus transdonis al mi post la morto de sia edzo, reale atestas pri la vigla intereso de Alfred por la esperanto-literaturo. Tiu libraro nun kompletigas la kolektojn de CDELI serve al ĉiuj, kiuj deziras malkovri la kulturajn riĉaĵojn, kiuj sin humile kaŝas en la esperanta beletro.

Claude GACOND.

Libroj

Dumvintra legado de “*Varmas en Romo*” de Corrado TAVANTI

Kiam la termometro persistas en la negativa zono kaj la ĉielo grizas, estas agrable sidi en fotelo ĉe la forno kaj legi libron kun la titolo “*Varmas en Romo*”. Ne estas novaĵo, ĝi eldoniĝis en la jaro 1986, ricevis la premion Argus, kiun ĝi certe meritis, kaj trovis favorajn recenzintojn kaj legantojn.

Corrado TAVANTI ludigas la heroojn de tiu krimromano sur roma fono en

medio de esperantistoj konfrontataj al krimoj. Li pentras kun simpatio, ofte kun humuro kaj ironio, la etoson de tiu urbo kaj de ties diversklasaj homoj, kiujn li konas el propraj spertoj kaj observoj. Regas la etoso de la “plumbaj jaroj” en Italio kun la teroristaj atakoj de la “Ruĝaj Brigadoj”. La rabo kaj ekzekuto de la iama ĉefministro Aldo MORO restas ankoraŭ en ĉies memoro. Ne mirige do, ke okazas bomb-atenco kontraŭ la madagaskara ambasadejo fare de iu mistera Armeo Liberiga Esperantista, kio devigas komisaron Piero DE ANGELIS entrepreni enketon

en prema varmego mezsomera. Implikiĝas ankaŭ la reportero kaj esperantisto Danilo CERRI konanta la verdan medion. Dekomence li dubas: *“La niaj ne faris tion, ili estas trankvilaj.”* Tamen lia konvinko ŝanceliĝas, kiam li volas informiĝi ĉe Libero FABIANI, esperantisto anarkisttendenca, kaj trovas lin mortpafitan, dum ankoraŭ funkcia gramofono ludas *“La Esperon”*...

Ne senriproĉaj herooj

Ekde tiam CERRI kaj DE ANGELIS ne havas trankvilan minuton kaj la eventoj pelas unu la alian. Ambaŭ estas la ĉefroluloj en tiu krimromano. Ili ne estas senriproĉaj herooj. Corrado TAVANTI montras ne nur iliajn fortajn sed ankaŭ malfortajn flankojn. CERRI licenciĝis pri juro – ĉiuj alparolas lin per la titolo doktoro – kaj iam estis ĵurnalisto en grava ĵurnalo, sed pro drinkemo maldungita pergajnas la vivon en vegetanta gazeto, kiu povas portempe altigi la eldonciferon dank'al liaj artikoloj pri la bomb-atenco kaj ĝiaj sekvoj. DE ANGELIS revis pri diplomata kariero kaj fine iĝis polica komisaro. Sed almenaŭ li ĉiam kondukas kaj vestas sin kiel diplomato kaj klopodas ne incitiĝi pro la insultoj de la renkontitaj personoj. Cetere la aŭtoro avertas la legantojn, ke *“iuj italoj el ia ajn socia klaso esprimas sin ofte per triviala lingvaĵo”*. Efektive eĉ la poliestro de Romo dum telefona interparolo kun sia kolego en Milano sakras pri la ministro kaj kutimas fari tion ankoraŭ pli ofte parolante al siaj

subuloj... En tiaj scenoj la romano iĝas satiro pri la burokrataro.

Kapturna ritmo de la eventoj

Kun CERRI kaj DE ANGELIS ni do ekveturas per rusta kaj ĝibumita Fiat 850 nomata “Karolino” tra la densa roma “trafikmarmelado”, piediras tra stratoj kun fiŝvendistaj standoj fiodoraj kaj sobante per lifto – el kies ŝakto soras fetoraj haladzoj – ni estas blokitaĵ... ĉar la pordistino ne ricevis trinkmonon. Atestantoj de krimo krude insultas nin kaj ĉiupaŝe ni devas eviti minacantajn kuglojn pro nia tro granda scivolemo pri la Roto PINELLI. En ĉiu ajn kvartalo obsedas niajn orelojn la mieloza napola kanzono *“Nannaré tutta mia...”* kiu ĵus gajnis konkurson. Per tiaj nelongaj priskriboj vivantaj kaj trafaj la aŭtoro kreas realisman etoson. Kompreneble mi ne sensualigas al vi la tutan intrigon, sed instigas vin mem legi tiun turnoriĉan krimromanon kun viglaj dialogoj. Tamen oni povas malkaŝi, ke okazos aliaj atencoj kaj ke la enketo direktiĝas poste al Milano kaj Komo. Ĝi atingas sian klimakson, kiam milana komisaro kaj DE ANGELIS kulpigas Danilon CERRI pri mortigo de la konsulo de Salvadoro kaj arestas lin ŝeklante liajn pojnajn. Okazas tiom da nekredindaj mistifikaĵoj, ke la povra Danilo demandas sin, ĉu li ne suferas pri dispartigo de la personeco. La tiurilatan ĉapitron oni povas legi ankaŭ kiel satiron pri la krimromana ĝenro.

Stilo flua kaj nuancoriĉa

La lingvaĵo de la dialogoj kaj priskriboj estas flua kaj nuancoriĉa kun

originalaj vortkreaĵoj kaj parolturnoj. La jam menciitaj sakroj kontrastas kun elegantaj frazoj. Oni evitas laŭeble mal-vortojn. Abundas italaj esprimoj kaj nomoj klarigitaj en glosaro. Jen kelkaj vortoj neordinaraj: sobi (mal-supri), sori (suprenglisi), ŝekli la pojnojn (mankateni), dum “havi la bovlon plenan” (ne plu elteni) ŝajnas al mi esti francismo.

Pri la aŭtoro

Corrado TAVANTI (1919-1995) naskiĝas en la itala urbo Arezzo. Li partoprenas la duan mondmiliton kiel volontulo en la itala armeo, estas kaptita en Afriko kaj transportita al Usono kaj revenas seniluziite al Toskanio en 1946, kie li doktoriĝas pri politikaj sciencoj. Li trovas laboron alifakan en biskvitfabriko en Milano, edziĝas al svisino kaj poste iĝas reprezentanto kaj importisto de svisa ĉokolado. En 1952 li ekloĝas en Svisio kiel laboristo kaj poste oficisto en ĉokoladfabriko kaj fine fariĝas prokuristo. Pro rena misfunkcio li frue emeritiĝas. Li verkas multajn novelojn kaj teatraĵojn en la itala. Abundan materialon li ĉerpas el siaj spertoj kiel konsula agento en La Chaux-de-Fonds, kio metis lin en kontakto kun la italaj enmigrintoj. Post emeritiĝo li realproksimiĝas al esperanto per koresponda kurso de KCE kaj per plustudo kaj konversacioj kun Perla MARTINELLI kaj Giorgio SILFER. Henri VATRÉ amike kuraĝigas lin al verkado. TAVANTI recenzas librojn kaj el sia plumo fontas du krimromanoj, la dua kun titolo “*Tiu*

toskana septembro” en kunlaboro kun István ERTL.

Richard SCHNELLER.

La 1-an de februaro la gazeto *L'Impartial* anoncis la morton de vidvino Berthe-Suzanne TAVANTI, naskita STAUB. Ŝi estis 86-jara kaj konata sub la amika nomo “Mimi”.

Claude GACOND.

Vivo de Andreo CSEH

Ed Borsboom

Hago, Internacia Esperanto-Instituto, 2003. 313 paĝoj, 8 kun fotoj. Kun listo de la mallongigoj, kronologio, fontoj, indekso de personoj.




Ed BORSBOOM, naskita en Hago en Nederlando en 1936, studis germanistikon kaj instruis la germanan en la altlernejo de Utrecht ĝis sia emeritiĝo en 1999. Li lernis esperanton en 1951, helpis al Andreo CSEH dum siaj liberaj horoj ĉe Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, aktivis en TEJO, kaj fariĝis ŝtata tradukisto por

esperanto. En 1976 aperis lia biografio de Lanti. Dum la 80-aj jaroj li ĉiusomere donis kursojn pri literaturo ĉe KCE kaj ekde la 90-aj jaroj daŭrigis tiun ĉi aktivecon ĉe Kvinpetalo en Bouresse. Ĵurnalisme li verkis por *Literatura Foiro* dum 20 jaroj kaj tion ĉi li nun faras por *La Gazeto*. Ekde 1995 li prezidas la estraron de IEL.

Dum mi redaktadis tiun ĉi martan numeron de nia bulteno, en mia leterujo mi malkovris donacon de Ed BORSBOOM, kiu anoncis al mi, ke lia biografio de Andreo CSEH nun aperis. Vi povas kompreni, ke mi tuj haltigis mian laboron por trafoliumi tiun libron. Kaj je mia miro mi tuj malkovris sur la posttitola paĝo, ke tiu *'Vivo de Andreo Cseh'* estas fakte dediĉita *"Al Claude Gacond, amiko kaj inspira esperantisto."* Estas do kun komprenebla emocio, ke mi daŭrigis la esploron de tiu ĵus ricevita verko. Kaj mi baldaŭ konvinkigis pri ĝia valoro.

Tiun biografion mi sentas kiel fresko, kiu vivigas antaŭ niaj okuloj ne nur la aŭtoron mem de la Cseh-Metodo en plej diversaj fazoj de lia neimageble aventuroza kaj kuraĝa ekzisto, sed ankaŭ ĉirkaŭ li pli ol centon da aliaj aktoroj: amikoj fidelegaj kaj malamikoj obstinaj, malvaruloj helpemaj, enamiĝintaj lernantinoj, movadanoj sektemaj, esperanto-gvidantoj diktatore maltoleremaj al ĉio nova, miloj da kursanoj entuziasmegaj kaj el ili kelkaj homoj ludontaj ĉefrolon en ofte malfacilegaj momentoj. Du terure mortigaj mondmilitoj neniigas ilian por-esperantan aktivecon; anonce kaj sekve trudigis politikaj reĝimoj maltoleremaj

al la plej eta esprimo de la zamenhafa homaranismo, kiuj metis la rezistemulojn en konstantan vivdangeron. Ĉion tion bildigas tiu ĉi fresko antaŭ mirigitaj okuloj, kiuj malkovras, kiom bonaj aŭ malbonaj povas esti la homoj eĉ interne de esperantujo. Kaj oni ne povas resti pasiva observanto de tiu pentraĵo de pli malpli tuta jarcento. Oni sin demandas, kion oni estus farinta en tiaj cirkonstancoj. Kaj tio igas onin meditema pri la propra konduto okaze de kriza situacio.



Andreo Cseh instruanta

La lego de tiu ĉi biografio povas interesi plurajn publikojn:

Al instruantoj ĝi klarigas kiel naskiĝis kaj iom post iom maturiĝis la famiĝinta Cseh-Metodo.

Al la juna generacio ĝi realisme demonstros, kiom krimoplena estis la dudeka jarcento, kaj ĝi bedaŭrinde neniel promesas, ke la dudekunua

estos pli homeca; sed ĝi alportas psikologian ŝokon demandan pri la propra sinteno antaŭ tiaj politikaj eventoj.

Al la interesatoj pri la historiaĵoj kaj movadaĵoj ĝi multegon instruas. Kaj tiurilate fine de la libro tre utila *Indekso de la personoj* faciligas la retrovon de priskribitoj. Kiu serĉas precizigojn pri datoj de naskiĝo, esperantiĝo kaj morto de esperantistoj, per tiu indekso tiu trovos respondon al multaj demandoj.


Kaj interesatoj pri anekdotoj ankaŭ kontentos. Kiu partoprenis kurson de Ed BORSBOOM, tiu scias, kiom humorplena estas lia rakontmaniero. Ankaŭ lian libron karakterizas tiu rakontmaniero. La citaĵoj el leteroj aŭ artikoloj estas ĉiam trafaj. Ili kvazaŭ vivigas al ni la eventojn.

Do vere leginda kaj posedinda estas tiu *'Vivo de Andreo Cseh'*, kiu aĉetebblas ĉe CDELI pere de la libro-servo de Esperanto perkoresponde.

Kaj por konkludi tiun ĉi rapidan prezenton de la libro, mi citos anekdoton. Jen kiel la 83-jara Andreo CSEH rakontis, kiel lia patro Otto elektis sian edzinon:

En Ludus Otto ne konas allogan kandidaton. Antaŭ nelonge li aŭdis^s pri knabina internulejo de la monaĥinoj de Sankta Francisko en Sibiu. Kial ne serĉi tie? Li vojaĝas al tiu urbo kaj post mallonga serĉado trovas lernejon. Li revenas iom antaŭ la fino de la posttagmezaj lecionoj kaj proksime de la konstruaĵo atendas. Subite la krado-pordo malfermiĝas kaj inoj svarmas el

la korto. La junaj forkuras, sed la pli aĝaj kelkope kaj digne surpaŝas la



La gepatroj Gabriella kaj Otto Cseh kun sia filo Andreo en 1905.

trotuaron. Tiujn ĉi Otto speciale observas. Inter ili troviĝas adoltingo, kiu trovas plaĉon antaŭ lia vizaĝo. La sekvan tagon la fraŭlo denove ekstaras sur la sama loko kaj jen ree elvenas la knabino.

Nun li en certa distanco postiras ŝin. Je tiu momento ŝi malaperas en simplan domon. Evidente ŝi loĝas tie. Kiel daŭrigi? Otto volas unue konsideri la situacion kaj elpensi adekvatan strategion. Li foriras.

La trian tagon li revenas ĝuste antaŭ la vespermanĝo. Li sonigas la pordo-fragilon kaj aperas mezaĝa virino. Je la komuniko, ke li havas seriozan aferon por preparoli, nia heroo estas

enlasita. En la ĉambro kolektiĝas la domanoj. Nur tri personoj: la patrino kun sia 18-jara infano Gabriella, kaj la avino. La svatiĝanto tuj prezentas sin kaj mallonge donas informojn pri sia aĝo, familio, loĝloko, laboro kaj financa situacio. Fine post paŭzeto la vizitanto diras la kialon de sia veno, abrupte konkludante: "Pro tio, ke mi nun povas vivteni familion, mi serĉas edzinon. Mi petas la manon de la fraŭlino."

Granda konsterniĝo ekregas! La trio, verŝajne por defendi sin, laŭte rifuzas. En tiu momento Otto tiras el la poŝo pistolon kaj surtabligas ĝin. Emocie li akcentas: "Se mi ne ricevos vian filinon, mi mortpafos min ĉi tie." La virinoj ektimegas kaj subite la patrino krias: "Akceptite, vi edziĝos kun Gabriella."

Claude GACOND

Okaze de la maja studsabato ĉe CDELI, kies dato estas puŝita al la 24-a de majo, ni havos la unikan ŝancon aŭskulti Ed BORSBOOM rakonti pri la kaŝita vivo de Andreo CSEH.

Bona ŝanco

Sinjoro policisto, oni forŝtelis mian aŭtomobilon de ĉi tiu loko.

Vi havas bonan ŝancon, sinjoro! Mi ĵus volis noti vin, ĉar ĉi tie veturiloj ne rajtas halti!

Advokatoj inter si

Teruran malfacilaĵon mi havis hodiaŭ kun unu kliento. Li volis nepre konfesi sian krimon.

En librovendejo

Ĉu mi povus aĉeti je kredito la libron "Kiel oni fariĝas milionulo dum tri monatoj"?

Kaj kiam vi intencas pagi, sinjoro? Kompreneble, post tri monatoj.

Kun ebria kapo

Bonvolu diri al mi, kioma horo estas?

La kvina!

Ĉu matene aŭ vespere?

Matene!

Dankon! Kaj nur tion bonvolu ankoraŭ diri al mi, ĉu hodiaŭ matene aŭ hieraŭ matene?

La bona gasto

Kiam vi venos al ni por tagmanĝi?

Ni rigardu... Marde mi estos gasto, merkrede mi estos malsana; ĵaŭde mi denove estos gasto, vendrede mi estos malsana: do ni diru: sabate!

La bona patro

Nun, mia filo, vi havas jam dudek unu jarojn. Nun jam ankaŭ vi povus zorgi pri kelkaj aferoj.

Ekzemple pri kio?

Vi povus pagi la tri lastajn partojn, kiujn mi ankoraŭ ŝuldas pro vi infanveturilo.